

ĝisnunan terminon „oferto”. Post dezirata aprobo de la neologismo estus bone ŝanĝi la terminon por 05904 al „transportofro”.

3) 07215

Difino: Enspezoj kiuj devenas de regula ekspluatado de transportlinioj.


La ĝisnuna Esperanto-termino estas „ekspluatenspezoj”. Estas necese diferencigi inter speciale transportaj enspezoj kaj ĝenerale ekspluatenspezoj. Por trafikaj enspezoj ekzistas en *RailLexic* la ne difinita nocio 07218. Ĉar la difino temas pri ekspluatado de transportlinioj, ĝi evidente ne taŭgas por ĝeneralaj ekspluatenspezoj sub 07215. Tio estas eraro en la datumbanka ordo. Necesas vicigi la difinon sub 07218. Tiu nocio havas inferalie jenajn nacilingvajn terminojn: *traffic receipts* (angla), *recettes du trafic* (franca), *Verkehrseinnahmen* (germana), *prihodi od transporta* (kroata kaj serba). Taŭga Esperanto-termino estas „transportaj enspezoj” aperinta jam en la jaro 1971 en *Mala ŝezelznicĥka terminologija* = Fervoja Terminareto Esperanto-serbokroata kaj Serbokroata-Esperanto de eksjugoslaviaj esperantistoj-fervojistoj *Ludoviko Sekereŝ* kaj *Josip Zupaniĉ*, eldonita en *Beograd*.

Noto: La nomo „serbokroata lingvo” ekzistis en tiama Jugoslavio kiel oficiala nomo de la plej disvastigata tielnomata varianto de komuna lingvo.

Tamen, la nocio „enspezo” estas tre ĝenerala; laŭ PIV ĝi nur koncernas monon, kiun oni ricevas. Pli detala ekonomika nocio koncernas monsumon ricevitan de diversaj konsumantoj de varoj aŭ uzantoj de servoj, kaj reduktitan je impostoj, kiel orda negocado. Por ĉi tiu detala nocio mi proponas la neologismon „revenuo” (laŭ la anglolingva *revenue*). Post ties dezirata aprobo ni ŝanĝu la terminon 07218 al „transportaj revenuoj”.

Ĉi tiu traktato kaj mia prelego sub titolo „Problemo de signifoj de ekonomiaj terminoj en Fervoja Terminaro”, prezentita ĉe la 57-a IFEF-kongreso en *Braŝov*, estas siaspecaj kontribuajoj al plibonigo de fakaplika Esperanto.

D-ro Zlatko Hinŝt



Elĉerpita ??

pro la komprimataj, ampleksaj informoj ?

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagtstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj,

denove ni povas saluti kaj bonvenigi du novajn terminarajn kunlaborantojn:

- El Francio, kolego **Marc NOULIN** rete esprimis sian pretecon kunagi.
- El la refondita pola landa asocio, kolego **Witold CZERWIŃSKI** (pseŭdonimo **Vito REDSKY**) en la 57-a IFEF-kongreso eklaboris en nia sekcio.

Jen novaj retadresoj:

- **Marc Noulin** <m_noulin@club-internet.fr>
- **Vito Redsky** <vitred@wp.pl>
- **Emil Tudorache** <emilmioara@yahoo.com>



kongresa ekskurso – vizito en lokomotivmuzeo de *Sibiu*

Pri terminaj decidoj en Braşov

En la kongreso okazis du kunsidoj de Faka Komisiono. Partoprenis 10 terminaraj kunlaborantoj kaj 13 gastoj.

Ludoviko Sekereš atentigis pri nekontentigaj solvoj de la nocio 00873 (TeKu 122/paĝo 4, TeKu 123/paĝo 1, TeKu 124/paĝo 1), kaj de la nocio 08442 (TeKu 121/paĝo 6, TeKu 123/paĝo 1). El denova diskutado sekvis jenaj decidoj:

00873

Modifo de la difino al: Tuto de operacioj rilatantaj al kreado kaj disdonado de biletoj. Decidita termino anstataŭ „biletumado”: **biletemisio**

08442

Decidita termino anstataŭ „areo envagona porkarga”: **vagonkargadareo**

El la taskoj en TeKu 124 sur paĝoj 2 – 4, la partoprenintoj decidis jenajn terminojn:

00513 traksituo

00587 liberigo por surloka funkciigo

05123 ŝotrobalasto

06087 liniosekcio kromtrakcia

06654 regcentrejo

Nota: La difino en TeKu 122 sur paĝo 5 estis modifata al:

Centra regejo por tuto de itineraranĝado, trajnreguligo kaj funkciigado de elektrosbstacioj sur fervojlinioj.

06680 trafikcentrejo

06686 disponcentrejo dum perturboj

06721 disponcentrejo

Sekve la lastaj kvar nocioj montras jenan hierarkion: Trafikcentrejo (06680) povas esti aŭ regcentrejo (06654) aŭ disponcentrejo (06721). Disponcentrejo dum perturboj (06686) estas speco de disponcentrejo.

Tri restantaj taskoj

1. Traktante en Braşov la nocion 09217 (TeKu 124/paĝo 4), partoprenintoj dubis pri ekzakta traduko de nacilingva difino en senco de konstruaĵo („subtera trafikinstalaĵo”), ĉar la sekva parto de la difinteksto kaj pluraj nacilingvaj terminoj koncernas konstrumetodon. La dubintoj pravis! La ekzakta traduko de la germana difino tekstas:

Konstrumetodo por subteraj trafikvojoj, ĉe kiu unue estas instalataj la flankaj muroj, betonata la kovrilo, kaj rekonstruataj la superaj veturvojoj, kaj poste sekvas terfosado kaj konstruado de la subtera trafikvojo sub protekto de la kovrilo.

Laŭ pluraj naciaj terminoj la metodo estis unue aplikata en Berlino. Por via elekto de plej trafa termino, jen du eblaj solvoj:

Kvanto da varoj kaj servoj sur merkato, efektivigitaj de diversaj konsumantoj en kadro de iliaj aĉetpovoj.

Tio ne tuŝas la ĝeneralajn PIV-enhavojn „postuli” (firme esprimi sian volon, ke iu donu aŭ faru ion, kion oni rajtas havi) kaj „mendi” (postuli, ke iu faru ian poste pagotan servon aŭ liveru ian poste pagotan komercaĵon).

Sed la termino „domando” ĝis nun ekzistas nek en PIV nek en aliaj vortaroj. Ĝis dezirata aprobo fare de ekonomiko-responsuloj, por 02474 la termino „transportpostulado realigebla” restus kiel kompromiso en nuna situacio. Poste ni ŝanĝu ĝin al „transportdomando realigebla”.



postkongresa vojaĝo – per hotelŝipoj sur delto de Danubo

2) 05904

Difino: Disponigo de transportkapacito por plenumi la transportpostuladon laŭkvante kaj laŭkvalite.

La ĝisnuna Esperanto-termino estas „transportoferto”. Laŭ PIV, oferto estas propono de varo aŭ servo al kliento. IKEV aidonas la karakterizaĵojn de skribita formo (letero, anonco, afiŝo ktp). Por pli da precizeco miaopinie necesas diferencigi inter ĝenerala propono de varo aŭ servo laŭ la PIV-difino, kaj detala propono en skribita formo laŭ la IKEV-difino. Por nomi la ĝeneralan proponon mi rekomendas la neologismon „ofro” (laŭ la franclingva *offre*), kaj por la detala skribita propono la

1) vojkonstruo subtera laŭ berlina metodo
 2) konstrumetodo berlina (subtera trafikvojo)

Eventuale vi trovos pli bonan solvon.

2. En TeKu 121 sur paĝo 6 mi menciis la problemon de la nocio 10254 pri la franca *gare principale fret* („varstacio ĉefa”). La sole franca difino prisilentas ĉu temas pri varstacio (por kargi / malkargi vagonojn) aŭ pri ranĝostacio (por apartigi / kunligi vagonojn). Intertempe nia nova kunlaboranto *Marc Noulin* eksplikis la nocion. Laŭ tio eblas konkretigi la difinon al:

Ranĝostacio en kiu oni ĉiutage disigas kaj konsistigas regionajn vartraĵojn de kaj al varstacioj en determinita retparto.

Mia unua terminpropono estas:

ranĝostacio kolekta-distribua

Eventuale vi trovos pli bonan solvon.

3. Taskon speciale por niaj francaj kolegoj donas la nocio 01141-2. Jen la franclingva difino:



Antaŭ tiu universitata aŭlo en Braşov estis inaŭgurata „SKVARO ESPERANTO”

Emplacement où sont situés les organes de commande et de contrôle de signalisation et où les aiguilleurs accomplissent leur service, l'équipement d'enclenchement pouvant se trouver au même lieu.

La franca termino estas „cabine de signalisation”. Kolego *Henri Lafargue* tradukis la difinon al:

Loko kie troviĝas komandsistemoj kaj signalkontroliloj, regejestroj plenumas sian servon, kaj samloke povas esti instalita aparataro por interriglado.

Certe tio koncernas specon de regejo. La ĝenerala nocio „regejo” (01141-0) estas en PIV difinita kiel loko, de kie specialisto regas trakforkojn, signalilojn, itinerojn, blokinstalaĵojn. Du gravaj specoj de regejo rezultas el diversaj responsoj de tiu „specialisto”:

- Se la specialisto estas stacia trajntrafikestro = 00155 (france „agent-circulation”), la loko estas ĉefa regejo = 06693 (france „poste directeur”), kie estas decide pri la trajnsinkevo en la stacio kaj sur la alligitaj liniosekcioj.
- Se la specialisto estas «nur» regejestro = 00239 (france „aiguilleur”) – vidu en TeKu 121 kaj 122 sur paĝo 2, la regejo funkcias por trajnveturoj nur sub komando de trajntrafikestro en la ĉefa regejo.

La problemo en la difino rezultas el la kontraŭaj karakterizaĵoj „kie troviĝas komandsistemoj” kaj „regejestroj plenumas sian servon”. La unua karakterizaĵo supozigas pri ĉefa regejo, la dua pri subordita regejo. La demando al francaj fakuloj do estas, ĉu la fakesprimo „*situés les organes de commande*” signifas sidejon de stacia trajntrafikestro aŭ signifas instalitan aparataron funkciantan sub komando de trajntrafikestro. Laŭ la respondo ni konkretigos la Esperanto-difinon kaj pripensos plej taŭgan terminon.

Mi anticipe dankas pro kontribuoj por solvi la taskojn, kaj elkore deziras agrablan refreŝigan someron.

Heinz Hoffmann

Sekvas artikolo de nia nova kroata kunlaboranto d-ro *Zlatko Hinšt*. En *Braşov* li jam prelegis pri la temo.

Kiel pli precize apliki ekonomiajn terminojn – tri kazoj kun multaj detaloj –

En TeKu 122 sur paĝo 3 estas indikita la termino „transportpostulado realigebla” aprobita ĉe 56-a IFEF-kongreso en *Sopron* surbaze de mia propono por la nocio 02474. Ekster tio d-ro *Heinz Hoffmann* en sia letero de 26-a de majo 2005 demandis min por konsiloj rilate du aliajn kazojn de ekonomiaj terminoj, nome „transportoferto” sub 05904 kaj „eksploatenspezoj” sub 07215. Sekvas mia respondo pri la koncernaj aferoj:

1) 02474

Difino: Nombro de transportoj realigeblaj sub determinitaj kondiĉoj laŭ konsidero de klientaj postuloj.

La ĝisnuna Esperanto-termino estas „transportbezono”. La nocio „bezono” estas tre abstrakta; laŭ PIV ĝi koncernas mankon de io necesa al la atingo de celo. En multaj kuntekstoj kaj signifoj pri merkato estas anstataŭe uzata la termino „postulado”, laŭ PIV sinonimo al „mendado”, koncernanta tuton de la mendoj pri varoj aŭ servoj, kiujn la konsumantoj kapablas akiri en difinita tempo kaj je difinita prezo. La termino „postul(ad)o” ekzistas ankaŭ en Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro (IKEV) - eldono de *Kluwer Deventer* ekde 1975, *Antwerpen*, sub redaktado de *F. Munnikisma* - kaj en aliaj vortaroj je responda senco.

Kvankam mi proponis por la nocio 02474 la terminon „transportpostulado realigebla”, laŭ mia opinio pli bone estus anstataŭigi la ekonomikajn terminojn „postulado”/„mendado” per la neologismo „domando” (same kiel itala vorto) kun jena difino: